



aktuala

36-a ELDONJARO

Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo "Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge" kun la N°0 419 498 274, honorigita kiel "reĝa" societo ek de la 29a de Majo 1957.

Redaktoro: Paulo Branco, 29 rue Froissart 1040 Etterbeek, panb2001 @ gmail.com; Prezidanto: Angelos Tsimokos, 405 av. Louise 1050 Bruselo; Kasisto: Jan Amadori, jan.amadori @ gmail.com; Sekretario: Muriel Petit, 57 rue de Douvres 1070 Anderlecht, nurja @ belcenter.com. Kunvenloko n°2 rue Van Maerlant ĉiumerkrede 18h30-20h metroo MAALBEEK (tie nek poŝtkasto nek telefono).

Abona membriĝo nur por adresoj en Belgio, 10 eŭroj jare, konto EBG 000-0 123 048-52; Eltiro 150 ekzempleroj.
Informoj: www.esperantobruselo.org; aktuala.retejo.net; br11.leadhoster.com; ebg.skynetblogs.be; uea.org; paulo.retejo.net; barelo.blogspot.com; esperanto.net; esperanto.be; lernu.net; liberafolio.org; eo.eventeo.net
Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala Esperanto ne nepre spegulas opiniojn de ĉefa redaktoro aŭ de EBG- Esperantista Brusela Grupo

ENHAVO

- Paĝo 2 - Poemaro de Garcia, Bronŝtejn, Camoens, Kalocsay
- Paĝo 3 - UK96 Kopenhago laŭ Paola Tosato kaj laŭ Saliko
- Paĝo 8 - Kataluna Internacia E-Semajno laŭ Rafaela Urueña
- Paĝo 11 - Frandu Vi 3an KuKon kaj 23an Eŭropan Rendevuon
- Paĝo 11 - Du ŝercoj kolektitaj kaj tradukitaj de Lucien Michaux
- Paĝo 12 - Estraro de TEJO; Pasporta Servo
- Paĝo 13 - La Neĝo en Flandrujo laŭ Jakvo Schram
- Paĝo 15 - Pri Baptismo, Anabaptismo, Menonismo, Amiŝismo
- Paĝo 18 - Kongresaj Fotoj: 96a UEA, 84a SAT, 70a HEF, 47a BET

PROGRAMO DE LA MERKREDAJ KUNVENOJ

EBGrupo ferias dum Julio, Aŭgusto kaj duono de Septembro

Julio 2011

- 28.06-02.07 70a Kongreso de Hispana E-Federacio, Eskorialo, Hispanujo
- 9-16.07 47aj BET - Baltiaj Esperantaj Tagoj en Malpils, Latvujo
- 23-30.07 96a Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago, Danujo
- 30.07-6.08 84a SAT Kongreso en Sarajevo, Bosnujo-Hercegovino

Septembro 2011

- 14 Bernard-Regis Larue, nia dumviva membro, prelegas pri vojaĝo al insulo Malto
- 21 Rodica Todor, nova prezidanto de IFEF, prelegas pri sia lando Rumanujo
- 28 Piet Glorieux, el Kortrijk, prelegas pri Klimata Varmiĝo de Nia Planedo

Grupanoj aŭ ne, prelegontoj estas ege bonvenaj, bonvolu sin anonci

2

POEMARO:

SOPIRANTE AL VI

Kiu kiel vi nutras l' amon mian?;
Aj !, kiu kiel vi pri mi sopiras? .
Same al la suno kiu deziras
enmeti en la nokton la radian

brila-lumon; mi, en la animon vian
volas flugi; kaj tien mi eniras,
ĉar en via interno mi akiras
la emocio-amon harmonian.

Kiu kiel vi al mia ekzisto
donas vivon, kiu nur por vi estas
konceptita? Kiu al mia tristo

donas ĝojon? Mi, interne vin nestas,
kaj estas mia plej ega insisto
esti ĉiam kun vi kie vi restas.

Alberto Garcia Orive, 2.2.2011, Hispanujo

SONETO

En la mezo de Septembro,
Antaŭ plu', venonta poste,
Trabkviliĝas ir' de l' tempo,
Pace ekas la ripoz' de

Bedoj de asteroj buntaj,
Nigre brila merlaretto,
Plaŭdo fiŝa, zumoj burdaj...
Eĉ du nadloj en diskreto

Taktan movon bremsis trene,
Haltis post tiktakta febro,
Ripozantaj kun naiv'

Pigre, pene, plenserene
En la mezo de Septembro
Malrapide fluas viv'.

Mikaelo Bonŝtejn, 16.9.2004, Tiŝvin, Rusujo

SONETO

Se por l' sorto kontraŭa, karulino,
En via mano mia ĝojo nestas,
Nun sur la tero tomb' al vi ne restas,
Por ke al mi ne restu milda sino.

La akvoj de la maro el fascino
Eterne vian strangan ĉarmon festas
Sed dum en mi sin vivo manifestas
Vivanta ili trovos vin sen fino.

Kaj se potencos tiom vers' sovaĝa,
Ke longan historion ĝi promesos
Al amo tiel pura kaj magia,

Mi vi ekkantos per la lir' omaĝa,
Kaj dum memoro sur la ter' ne ĉesos
Fariĝos mia verk' subskribo via.

Luis Vaz de Camoens (1525-1580)
Tradukis Geraldo Mattos, Brazilo

SUNSUBIRO, 1931

Jam iĝis kupro la tagmeza or'.
Ĉe l' horizont' la sun' adiaŭluma,
Okul' gigante granda, plorbruluma,
Rerigardante pasas drone for.

Kaj kvazaŭ sang' fluinta ĵus el kor',
Jen arda ruĝo sur fenestro doma.
Moment'... kaj estingiĝas ruĝ' fantoma,
Kaj jen la dom', rabite pri l' trezor'.

Malluma domo. Lumon lamp' ne ŝutas.
Ĉu l' mastro dormas, aŭ eterne mutas,
Plu lin ne vekos la maten' radia?

Mallum', mallum' mallum' tra l' domo tuta.
Rigardas nokton la fenestro muta
Kun ros-malseka vitro apatia...

Ĉu mi revidos vin, ho kara mia?

Kálmán Kalocsay (1892-1976)

UK 96 KOPENHAGO

Raporto pri la 96a Universala Kongreso en Kopenhago far de Paola Tosato el Bologna, Italujo.



Paola Tosato fotita de la redaktoro dum UK Ĉi-jare la Universala Kongreso de Esperanto, organizata de UEA, okazis de la 23a ĝis la 30a de julio en Kopenhago, tiel nomata Venecio de la nordo pro ĝiaj multenombraj kanaloj. Do, mi forveturis el la milda mediterranea klimato al la norda vetero, certe malpli suna. Mi alvenis je la 22a de julio, vendredon: mi tuj ekkonatiĝis kun la urbon kaj studis la planon por la semajno. La hotelo kie mi loĝis, Hotelo Selandia, estas lokita en strategia punkto, proksime de la centra stacidomo kaj de aliaj interesaj lokoj. Male la kongresejo, Bella Center, estas

3
kontraŭe lokata en la 3a zono de la urbo, do pli malproksime de la centro, sekve mi uzis la urbajn trajnojn kaj la metroon por transmoviĝi.

Sabaton mi aliĝis al la kongreso, renkontis esperantistojn kiujn mi jam konis kaj vespere mi iris al la tradicia “Movada Fojro” por informiĝi pri la venontaj renkontiĝoj.

Dimanĉon estis la solena malfermo, tamen mi komencis tuj ekskurson al Roskilde, vilaĝo kiu havas la faman Muzeon de Vikingoj: tie mi vidis la ŝipojn de ĉi tiu popolo, mi dokumentiĝis pri la historio ankaŭ per filmo kiu estis spektigita dum la vizito. Do mi elkovris ke ĉi tiu popolo, origine de Danlando, disvastiĝis en la tuta mondo, precipe en Eŭropo, sed ili tuŝis ankaŭ Nordan Amerikon kaj la okcidentan parton de Azio, en Italio ili pasis tra Ĝenovo kaj, laŭlonge la kosto tirena, ili alvenis al Kalabrio. Ili estis maristoj, ĉasistoj kaj iom terkultivistoj. Finfine mi vidis la ilojn kaj la materialojn per kiuj ili konstruis la ŝipojn. Posttagmeze estis la ekskurso per boato tra la kanaloj; estis malbona vetero, tamen ĝi plaĉis al mi.

Lundon, matene, mi vizitis la Muzeon de la Laboristoj kiu ilustras la vivon de la laboristoj de 30 ĝis 50 jaroj, la evoluon de la industria laboro ĝis la nuntempo kaj la vivon de dana familio: tri generacioj de laboristoj de 1885 ĝis 1990. Poste mi promenis tra la

4
piediraj stratoj de la centro, plenaj de vendejoj, mi iris ankaŭ, dum ĉi tiu promenado, en la latina kvartalo. Vespere okazis la komuna vespermanĝo en turka restoracio: estis okazo por gustumi orientan kuirarton kaj por stari kune kun la aliaj de nia grupo.

Mardon, komence mi aŭskultis la prelegon pri “tutmondeca esperanto”: ekzistas 7 projektojn, mi haltas sur la unua punkto: la bona vortaro. Ĝi rilatas pri la “Bona lingvo” de Claude Piron de 1889 kiu kritikis troan uzadon de novradikoj, tamen ne ekzistas esperanta vortaro kiu aplikas liajn ideojn. La plej influa vortaro estas PIV kiu havas grandan nombron de radikoj, la vortaro REVO havas, kontraŭe, malpli da radikoj. Konklude la bona vortaro subtenas facilan esperanton, per malmultaj radikoj kaj eleganta vortfarado, preferas kunmetitajn anstataŭ novradikajn terminojn, donas informojn pri la diferenco inter ĝenerala kaj faka lingvouzado, donas preferon al fundamenteco, tamen ne ignoras la evoluon. Posttagmeze mi aŭskultis la prelegon pri Mez-Oriento kaj Nord- Afriko kie estas ankoraŭ malfacile la uzon de la lingvo esperanto. Vespere mi festis mia naskiĝtago kiu okazis ĵuste ĉi tiun tagon: mi faris prezenton de ventro-danco kun mia tradicia kostumo kaj muziko.

Merkredon estis la unutaga ekskurso de nia grupo al urbo Koge, je ĉirkaŭ 45km de

Kopenhago. Tie ni vidis la fojron en la centro, la miniaturan urbeton kaj la muzeon pri la dana historio. Vespere mi iris al koncerto kiu estis sub libera ĉielo proksime de la rivero.

Ĵaudon denove mi pasis la tagon en la kongresejo kaj mi aŭskultis ĉi tiujn prelegojn: la unuan pri la internacia revuo “Esperanto” kaj ĝiaj legantoj, la duan pri du danaj lingvistoj (Rasmus Rask kaj Otto Jespersen) kiuj vivis inter la fino de 800’ ĝis la unuaj jaroj de 900’ kaj kiuj estis favoraj al Esperanto kiel internacia lingvo, la trian pri la aŭtoro Tibor Sekeli de kiu mi legis libron por mia esperantaj ekzamenoj; li faris multajn vojaĝojn, lernis multajn lingvojn kaj, krom skribi verkojn, li ankaŭ faris desegnojn kaj skulptaĵojn. Krome mi aŭskultis la aŭtoran duonhoron dediĉitan al hungarino kiu skribis libron pri la movado kaj mi, ĵuste en ĉi tiu okazo, aĉetis ĝin. Vespere mi iris al kafejo Mandela, tipa trinkejo de la urba centro kie okazis belan koncerton de tri junuloj.

Vendredon mi aŭskultis kaj mi vidis danckoncerton: per violono koncerne la koncerto, per naturaj movadoj koncerne la danco. Posttagmeze mi kantis en la Internacia Koruso preskaŭ dek kantojn esperante en koncerto (mi faris por tio celo la provludojn dum la semajno). Vespere estis la tradicia Internacia Arta Vespere kie, kun la koruso, mi prezentis unu kanton.

Sabate mi foriris matene post la lasta promenado kaj revenis hejmen. Do estis semajno plena je okupoj kaj interesaj aktivecoj kaj sendube mi revenis riĉiĝinta je nova sperto.

Paola Tosato, 31.7.2011, Bologna, Italujo

96A UK LAŬ SALIKO



Saliko fotita de la redaktoro dum UK

Ĉiun UKon antaŭas grandegaj faka organizado kaj sindediĉa libervola laboro, kiu daŭras ankaŭ post la evento. Por la kongresanoj tamen la UK estas festo unusemajna. Ili elektas el la vasta oferto tion, kion ili deziras kaj povas digesti kaj enmeti en sian propran horaron. Neniu kapablas plene profiti kaj elĉerpi la programon. Multon vi vidos ĉe <<http://esperanto.com/uk2011>>, kie aperas ekzemple la 6 numeroj de la Kongresa kuriero "Vikinga Voĉo". Tie vi legu

pri la Kleriga lundo kaj pri la Tago de lernejo. Serĉante vi trovos ankaŭ fotarojn en la TTT. Jen kelkaj miaj impresoj kaj travivaĵoj dumkongresaj.

La Kongresejo

Estas moderna nova Bella Center sur la insulo Amager, ĉirkaŭ 4 km for de la urbocentro. Ĉirkaŭe etendiĝas la verdaj pulmoj de la ĉefurbo: densaj arbetaroj kaj arbedoj, herbejoj florantaj, bonodorantaj. Apude staras maje malfermita hotelo Bella Sky, per koridoro konektita kun la kongresejo. Ĝi konsistas el du 22-etaĝaj turoj, arkitektura mirindaĵo, ĉar la bazo estas pli mallarĝa ol la supro kaj la turoj iom tordiĝas. Proksime rotacias gracia ventelektrejo (ventmuelilo, turbino). Danujo ja estas ebena lando konsistanta el duoninsulo kaj pli ol 400 insuloj, kie maro neniam malproksimas pli ol 50 km kaj kie ventoj fortas. La salonoj de la kongresejo estas komfortaj, facile troveblaj, kun ĉiaj modernaj teknikaj helpiloj: Zamenhof, Canuto, Friis, Hodler, Kehlet, Lapenna, Neergaard, Noll, Privat, Skeel-Giorling, Thorsen, Vermaas, du Zachoj. Ankaŭ kafejoj kaj restoracioj troveblas, sed la prezoj fortimigas la kongresanojn, kies monujo ne dikplenas.

La Solena Inaŭguro

Sur la ekrano en la antaŭo de la salono Zamenhof montriĝas filmo pri afrikanoj kun esperantaĵoj, gaje kantantaj, bele marŝantaj, junaj, aktivaj. Inter la kongresanoj tamen ne vidiĝas multaj aliĝintoj el tiu kontinento. Mi atentis la salutantojn. Povus esti salutoj el 66 landoj, sed dudeko da landoj ne salutas. Okazis

5

vizaj kaj financaj problemoj, malsukcesoj. Mankas reprezentantoj el orienta Europo, Irano, Balkanujo, suda kaj centra Ameriko... La reprezentanto de Norvegujo salutas larmante pro la ĵusa amasmurdo en sia lando: "Nur amo povas venki malicon kaj malamon. Amu!" Pro la tragedio ĉiuj ekstaras por silenta memormomento. Longa danlingva parolado de iu organizo ekĝenas la aŭskultantojn sed venas la traduko kaj klarigo, ke Esperanto lasas lokon al ĉiuj lingvoj. La temo de la UK: Proksimigo de kulturoj.

Movada Fojro = Interkona Vespero

Kolora brua tumulto ĉirkaŭ kaj preter la budoj de multegaj organizaĵoj, asocioj, eldonistoj, aktivistoj. Fotado, ĝojo, scivolemo, surprizaj kaj sopiritaj renkontiĝoj.

Nacia Vespero

En la fama Kopenhaga amuzejo Tivoli ni estas regalataj per pianludado, kantado, pantomimo, baletoj. Unika ŝanco aŭdi kaj vidi la amatoran Inuitan koruson Aavaat en ties admirindaj tradiciaj vestoj. Poste vagado sub diverskoloraj lampoj, tra floraj kaj parkaj aleoj, preter fontanoj, trans akvoj.

Libroservo kaj Aŭtoraj Duonhoroj

Dumkongrese dudeko da Esperanto-aŭtoroj prezentis sin en la Libroservo, kie staris tablegoj kovritaj per ĉiaj verkoj, diskoj kaj aliaj materialoj. Se nur sufiĉus la mono kaj la spaco en la valizo, la tempo por tralegi!

Prelegoj pri Danio

La prelegoj konatigis la aŭskultantaron, ekzemple, kun dana triopo de fizikistoj, kun la fabelisto

6

H.C. Andersen, la Vikinga epoko (la 8a -11a jarcentoj), Martinus-filozofio, danaj kortumoj. Vidinda estis la zorgeme preparita diaporamado kaj prelego pri Gronlando. Kompreneble okazis kurso pri la dana lingvo.

Urbeŝtra Akcepto

Centoj da diverslandaj kongresanoj estis invitataj al la Urbodomo, kie la gekelneroj surtabligis fruktojn, malvarmajn trinkaĵojn kaj farĉitajn krespoduonojn, rozobukedojn en vazoj. Tio tre refreŝigis en la varmega vetero. La tabloj rapide malpleniĝis. Mi malfruis, ne aŭdis la paroladon de la vic-urbeŝtrino (urbeŝtrino pri kulturo). Mi serĉis mian vojon en la urbocentro kaj malfruiĝis ankaŭ de la kariljona koncerto en la preĝejo de la Sankta Spirito. Preĝejoj kaj preĝejejoj konstruaĵoj ja abundas en Kopenhago. La koridorojn de la urbodomo interese ornamas blazonoj ĉe la plafono.

Internacia Kongresa Universitato

Kiaj mult-temaj prelegoj, nun poste haveblaj kiel presitaĵo: La profundo de la ĉielo (la ŝanĝiĝo kaj evoluo de la homa kompreno pri la universo), astrobiologio, danĝera kaj utila oksigeno, revigliĝo de hebrea lingvo, minaco de HIV al tutmonda junularo, Zamenhofaj revoj, interlingvistika laboro de Otto Jespersen, maŝintradukado. Nur kelkaj el la prelegantoj tro multe uzis bildojn kaj tekstojn projekciajn sur grandan ekranon malantaŭ sia dorso. Se la vidaĵoj ŝanĝiĝas tro rapide, la publiko laciĝas. Memoru ke nenio povas anstataŭi la viklecon de la homa preleganto, ties vivan uzon de siaj

voĉo kaj korpo, mienoj por la sukceso de la prelego.

[Paroligaj Ekzercoj, Lingvolernado, Kerekzamenoj](#)

Jes, partoprenu! Profitu! Dankinda laboraro de Katalin Kováts kaj aliaj, de ILEI, de Lernu!

[Ekskursoj](#)

El la ekskursoj mi elektis konatiĝon kun Kopenhago, vizitadon de la Vikinga muzeo en Roskilde kaj la Muzeon pri H.C. Andersen en Odensee, Fyne-insulo. Ambaŭ plene kontentigis min. En la andersena muzeo estas montrata tuta lia vivo, liaj verkoj kaj ties tradukoj, lia epoko, papertondaĵoj faritaj de li, liaj vestaĵoj kaj gustoj...

Sur malgranda suna scenejo geknaboj prezentas andersenan teatraĵon. Homoj spektas, piknikante sur herbejo. Apude viziteblas folkora kaj agrikultura muzeo pri kampara vivo en la 19a jarcento kun tradiciaj domoj, laboriloj, dombestoj, odoroj, ĝardenoj, manlaboraĵoj, metioj. Vidu <www.odensee.dk> se tio interesas vin.

En la Vikinga muzeo oni montras epokajn restaĵojn de la ŝipoj, la arkeologian laboron pri ili, rekonstruitajn modelojn kaj verajn ŝipojn sur la maro, vilaĝojn kaj vivmanieron de tiu epoko, filmojn. Impona estis la filmo pri la velado de la ŝipo " Mara Virĉevalo de Glendalough " al Irlando, en 2007-2008, kun 65-membra ŝipanaro. Oni povis kun ili travivi la malfacilaĵojn de la marvojaĝego. Vikingoj estis ne nur militistoj kaj rabistoj sed ankaŭ terkultivistoj, fiŝkaptistoj, simple

homoj kiuj siamaniere provis vivteni sin kaj plilarĝigi sian mondon.

Vidu www.roskildemuseum.dk.

Samekskurse ni vizitis la mezepokan katedralon de Roskilde, kiu siatempe tre gravis por la tuta Skandinavujo kaj Baltujo.

[Teatraĵoj, Filmoj, Koncertoj](#)

Ne pri ĉio rakontebblas.

[Internacia Koruso](#)

La koruso sub la gvido de Alan Bishop sukcesis kunmeti ĝindan koncerton en nur kelkaj laborplenaj tagoj.

Inter alie kortuŝe kantis Juan Angulo Hernandez el Kubo. Lia dika iom aspra voĉo konvenas al kantoj pri la monda maljusto.

Tamen li ripetis: Ne ploru ... estas la vivo. La koruso per anonco en la kongresa kuriero trovis por si bonan akompaniston.

[Farandolo](#)

Tra la urbaj stratoj gaje marŝis 60-100 kuraĝuloj, kun blanka tuko ĉirkaŭkape kaj la nomo de sia gepatra lingvo pentrita sur ĝi. Ili kontaktiĝis kun la homoj survoje, petolis kaj malsekiĝis en la pluvo. "Publiko magris ... sed gaja etoso viglis, kantoj kaj ridoj abundis" (laŭ Kongresa Numero 141).

[Akcepto de la Societo Zamenhof](#)

En la 23a etaĝo de Hotelo Bella Sky: kuraĝigaj kaj dankaj paroladoj, fruktoj kaj legomeroj, trinkaĵoj, kafo kun kuketo sed antaŭ ĉio vasta vidaĵo el la fenestroj ĝis la fora urbocentro en la horizonto, vidaĵo ankaŭ sur la apudan junularan gastejon Danhostel, kie tranoktis kelkaj kongresanoj inter la partoprenantoj de bicklista konkurso samtempe okazanta.

[Internacia Arta Vespero](#)

Ĝinda kombinaĵo de ĉiaj muzikoj. Tradicia dancado el Nepalo, belvestaj nepalanoj flirtas sur la scenejo kiel malpezaj buntaj papilioj, ankaŭ la fingroj de la virinoj dancas. Vice solena eŭropstila kantado. Petoladoj de modernaj ensembleoj. Kortuŝaj kantoj pri amo kaj sufero. La programo daŭras ĝis post la 22a horo. Supozeble aŭdatas io por ĉiu gusto.

[Premioj](#)

Novaj honoraj membroj nomitaj Detlev Blanke, Renato Corsetti, Rob Moerbeek.

Premio Onisaburo Deguchi donita al japano sro HORI Jasuo.

Premio pro aktiva informado kaj aktivado en la movado al finno sro Jorma Ahomäki.

Rezultoj de belartaj kaj oratoraj konkursoj vi trovos en iu alia fonto.

Mi plene ĝuis la kongreson sed ne povis ĉion noti, kaj ankaŭ vi ne povus ĉion legi sen tediĝi!

Saliko, 11.08.2011, Finnlando, [saliko\(che\)kase.fi](mailto:saliko(che)kase.fi)

[INTERNACIA E-SEMAJNO](#)

La 19-a Internacia E-Semajno de la Kulturo kaj Turismo, okazos en Malgrat de Mar (Barcelona) de la 1-a de Oktobro ĝis la 8-a de Oktobro 2011.

De la 2a ĝis la 9a Oktobro 2010 okazis la 18a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo en Coma-Ruga (El Vendrell, Baix Penedès, Tarragona).

Okaze de ĉi evento, Rafaela Urueña, doktorino pri Juro, membro de la Akademio Internacia de la Sciencoj, ricevis la prestiĝan

premion Ada Sikorska, kiun transdonis al ŝi Gian Carlo Fighiera. La retejo de HES Hispana Esperanto Federacio prezentis la raporton verkitan de Rafaela Urueña pri la Semajno.



E-Semajno en Coma-Ruga

Unu plian fojon, ĉifoje en Coma-Ruga, urbeto apartenanta al Vendrell (Taragono) okazis la Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo, de la 2-a ĝis la 9-a de oktobro. La nombro de la partoprenantaro estis tre granda kaj vere internacia, inter ili kelkaj gravaj aktivuloj de nia movado, inter kiuj mi elstaras D-ron Renato Corsetti.

Post la disdonado de la dokumentoj, en taŭga plastika teko, komenciĝis la kurso de Esperanto, gvidate dum la tuta semajno, de S-ro Marĉek, kaj vespere la unua interkona vespero, en kiu ni gustumis manĝetaĵon kaj ĉampanon "Esperanto". Dimanĉe okazis la inaŭguro de la Semajno, prezidate de membro de la Urbokonsilantaro de Vendrell, pro neebila ĉeesto de la Urbestro, kiu sendis salutmesaĝon, tradukita en Esperanto de S-ro Aragay. S-ro Fighiera kaj D-ro Corsetti salutis la ĉeestantojn, ĉi lasta, sprite

komentariante la ekzistantajn antaŭjuĝojn pri Esperanto. Fine S-ro Torné legis salutmesaĝon de la Prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio. La inaŭguro finiĝis per donaco al la reprezentanto de la Urbestro, fare de S-ro Luis Serrano, de la fama verko D. Kifoto kaj “Esperanto en Katalunio”, kies aŭtoro, S-ro Marco Botella, subskribis. Kompreneble, sekvis la komuna fotado por ĉiama rememoro.

Dum la Semajno ni ĝuis, parton kultura kaj parton turisma, kvankam turismo ankaŭ estas kulturo. Laŭ la unua flanko, la Semajno estis vere riĉenhava kaj mi ne nur elstaros kelkajn prelegojn, ĉar ĉiuj estis tre interesaj, laŭ diversaj vidpunktoj. S-ro Gian Carlo Fighiera, kiu prelegis dufoje, la unua la dimanĉon mem pri “Kelkaj noveloj de Boccaccio” rakontante temojn de tiuj noveloj sprite kaj vigle, kaj la dua pri “Rashomon” japana filmo pri la kvar veroj, kies temo multe plaĉis al la aŭskultantoj. D-ro Renato Corsetti, la sekvantan tagon, prelegis pri la interesa temo “Por ke lingvo estu tutmonda, ne sufiĉas paroli ĝin eŭrope”, kiu altiris la atenton de la ĉeestantoj. Aliaj interesaj prelegoj estis tiu de S-ino Löwenstein pri “Romo antaŭ 2000 jaroj”, tiu de S-ro Antonio Marco pri “Centjara datreveno de granda poeto, Miguel Hernández”, rakontante pri lia vivo kaj poemoj, kelkaj el ili, deklamitaj de la preleganto.



Rafaela Urueña, fotita de la redaktoro dum Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo, 14.05.2011 : <http://br11.leadhoster.com/110514/>

La geedzoj Michele kaj Hubert, montris al ni sur ekrano, la diversajn etapojn de la vivo kaj historio en Belgujo, per la prelego “Belgujo, lando de arto, scienco kaj folkloro”, kaj la geedzoj el Suda Koreio An Jong kaj Ko Kyung, bele koree vestitaj, prelegis pri “Solidareco de esperanto kaj folkloraj koreaj kantoj, en esperanto”.

Fine, S-ro Wolfgang Günther prelegis pri “Kiosko de Levante” revuo kiun li mem gvidas kaj eldonas.

Kaj permesu al mi nun diri ion pri la turisma flanko de la Semajno. Laŭ mi estis granda sukceso, gvidi nin, merkrede, dum la tuta tago al Montserrat, historia kaj religia kerno de la katalunoj, kie dum

libera tempo, ni havis okazon ĝui la imponan panoramon de la loko kie situas la monaĥejo kaj la diversajn ejojn tie vidindaj: La bazilikon, la muzeon, bibliotekon k.a. La bona vetero kiu akompanis nin, helpis vidi la panoramon ekde la supra parto kaj komforte promeni laŭvole ĝis la horo de la reiro al Coma Ruga, kaj survoje, halti por viziteto al vinkooperativo.

Aliaj ekskursoj, tiuj, duontagaj, estis al Muzeo Pau Casals, en la apuda urbeto San Salvador, kie ni vidis la domon de tiu mondfama violonĉelisto, kaj la muzeon kiu enhavas muziknotojn kaj muzikaĵojn de Pau Casals. Kiel fina aranĝo, ni havis okazon aŭskulti koncerton, de esperantista pianisto, kiu tre plaĉis al ni.

La alia duontaga ekskurso estis por viziti la Fondaĵon Apel·les en urbo El Vendrell. Temas pri la domo-muzeo de skulptisto kiu vivis samepoke al Picasso, kaj kie oni gardas belajn skulptaĵojn en ĝardeno kaj interne de la domo. Ni profitis tiun tagon, por malkovri memortabulon memore de la Semajno, apud la Urbodomo kaj kun ĉeesto de la Urbestro de El Vendrell, S-ro Benet Jané. Dum libera tempo, oni profitis la okazon koni la urbon.

Kiel jam estas tradicio, dum la Semajno, oni liveras la Premion Ada Sikorska-Fighiera, kaj ĉijare mi havis la honoron ricevi ĝin. Vere por mi estis grava honoro, ĉar ne vane mi konis persone Ada-n kaj eĉ mi ĝuis la amikecon de Ada

kaj Ĝian Carlo Fighiera, komencata ĉefe kiam ili loĝis en Madrido. Do, mi dankas vere tiun premion kiun instigas min daŭrigi la laboron pro Esperanto. Mi ricevis medalon kaj diplomon bele enkadrita.

Ni havis okazon vidi kaj aŭskulti per video la faman operon “La Bohème”, vespere, pretigate de S-ino Maria Ferigle, kaj alian vesperon la Ensemblo “Montjuic” gajigis nin per bela folkloro festo pri havana muziko, en la kafejo-salono de la Hotelo “Natura Park”, sidejo de nia Semajno. Bongusta tipa “cremat” (rumo bruligita kun kafo kaj aliaj spicaĵoj), varmigis nian jam varman etoson.

Fine, la lastan vesperon de la Semajno, okazis debato pri la sugestoj por estontaj Semajnoj. Oni pensis la eblecon ke la elementa kurso, gvidata ĝis nun jam de antaŭaj Semajnoj, estigos mezan kurson, ĉar oni supozas ke ĉiu partoprenanto jam scias Esperanton. Ankaŭ oni sugestis, dum la unua interkona vespero (ĉijare estis du), prezenti la eksterlandanojn aŭ pli bone prezentiĝi unu post la alia, por ke ni ĉiuj konu nin plej bone ekde la unua tago.

Konklude, bona Semajno, ripoziga klaj klera samtempe, kaj mi devas denove danki la laboremon de la kunordigantoj de la Semajno, S-roj Serrano, Aragay, Torné kaj Francesc Mas.

Rafaela Urueña, Valladolid, Hispanujo

Frandu Trian KuKon 22a-30a Oktobro 2011 (Loven-la-Nova apud Bruselo)

KuKo estas KURso por KOMencintoj dum 25 horoj, du semajnfinoj 22,23 kaj 29,30 oktobro 2011, tra rekta metodo, nur en Esperanto, gvidata de André Demarque, Françoise Pellegrin, Jean-Pol Sparenberg, Gunter Neue.

Prezo: 75 eŭroj. Por tiuj kiuj venas el alia lando, aŭ tro malproksime por reiri hejmen sabate, oni trovos loĝejon ĉe Esperantisto.

Aliĝo: André Demarque, Tel: +32 10 412925

Retadreso: ademarque@skynet.be

23a Eŭropa Rendevuo 12a-13a Novembro 2011 (apud Le Touquet-Paris-Plage)

Ĉe la Manika marbordo / au bord de la Manche
Stella-Plage en bela kaj komforta feriejo Stella-Maris

Sabaton, la 12an de novembro

11-14h	Akcepto de la partoprenantoj
15h00	Unua parto de la staĝoj
19h00	Vespermanĝo
20h30	Teatraĵo de G. Handzlik
22h00	Diskuttrondoj en nia knajpo.

Dimanĉon, la 13an de novembro

7h00	Matenmanĝo
8h00	Dua parto de la staĝoj
11h00	Vi mem elektos inter: -Promeno ĉe la strando de Stella-Plage -Vizito de la banurbo Le Touquet -Vizito de ties granda -Salono de la Libro (kun francaj verkistoj)
12h00	Komuna fotado
12h30	Tagmanĝo
15h00	Muzik-Festivalo
16h30	Fino de la staĝo
16h30-	Lasta vizito al la Salono de
19h00	la Libro en Le Touquet.

Prezo: 85 eŭroj por la tuta staĝo / la du tagoj kun kursoj, teatraĵo, muzik-festivalo, vizitoj, manĝoj kaj tranoktado

Aliĝo: Arlette Plutniak 22, rue d'Arras, FR-62123 Simencourt

Retadreso: aplutniak@esperanto-nod.org

DU ŜERCOJ DE LUCIEN MICHAUX

Mia venonta vivo... Ni devus retri vivi vivon.

Vi komencas morti. Tio forigas tiun traŭmatismen kiu sekvas ni la tutan vivon.

Poste, vi vekiĝas en maljunulejo, fartante pli bone tagon post tago. Tiam, oni elirigas vin pretekste de bona sano kaj vi komencas de enspezi vian pension. Poste, pro via unua labortago, oni donacas al vi de brakhorloĝo el oro kaj vi ricevas belan salajron. Vi laboras kvardek jarojn ĝis vi estu sufiĉe juna por profiti de la fino de via aktiva vivo.

Vi iras de festo al festo, vi trinkas, vi travivas multe da amokazoj! vi ne havas gravajn problemojn. Vi prepariĝas universitataj studadoj. Poste estas la gimnazio. Vi petolas kun viaj amikoj, sen alfronti devigojn, ĝis iĝi bebo.

La naŭ lastajn monatojn, vi pasas ilin trankvile flosanta, kun centra hejtado, ĉambroservo, ktp... Kaj fine, vi forlasas tiun mondon en orgasmo!.

Dua ŝerco:

Dum li ne volas ŝajni sensenta, li ankoraŭ ne volas preterpasi apud bona afero. Li tiam diras: "Antaŭ ŝalti, kial vi ne kisas min?"

Ŝi do volupte kisas lin. Post tiu kisaĉo, la motorciklisto diras al ŝi: "Ah! Estas la unua fojo ke oni kisas min tiamaniere. Tute estas talento kiun vi pretigas vin malŝpari. Vi povus iĝi fama. Sed kial vi volas memmortigi?"

"Ĉar miaj gepatroj ne ŝatas ke mi vestadas min virine".

Lucien Michaux [lumich07@yahoo.fr] pri Woody Allen

ESTRARO DE TEJO

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo TEJO ricevis novan Estraron en la 67-a Internacia Junulara Kongreso okazanta en la ukraina ĉefurbo Kievo. Łukasz Żebrowski el Pollando farighis la nova prezidanto, transprenante la postenon de la austro Gregor Hinker, kiu gvidis la junularan sekcion de UEA dum du oficperiodoj ekde 2007. En la antaŭa Estraro Żebrowski respondicis pri kongresoj kaj aktivula trejnado. Ankaŭ du aliaj estraranoj estis reelektitaj: Paulína Kožuřová el Slovakio daurigos kiel ĝenerala sekretario, dum la antaŭa kasisto Sergeo Tyrin el Israelo ekde nun respondecas pri informado.

Kvin anoj de la 8-kapa Estraro estas novaj: Alisa Nikitina el Ukrainio (kasisto), Nico Huurman el Nederlando (aktivula trejnado), Petra Smidéliusz el Hungario (landa agado), Michael Boris Mandirola el Italio (eksteraj rilatoj) kaj Tina Tišljarić el Kroatio (kongresoj).

La elekto de la nova Estraro okazis en la kunsido de la Komitato de TEJO la 16-an de julio. En la komunikado en la retejo de TEJO la Estraro, kiu stiros TEJO-n dum du jaroj ghis 2013", dankas pro la fido de la komitatoj kaj strebos laueble plenumi chiujn esperojn je ghi".

Gazetaraj Komunikoj de UEA, 17-07-2011, N-ro 418

PASPORTA SERVO

Nova adresaro de Pasporta Servo aperis. La chi-jara adresaro de Pasporta Servo enhavas 1087

gastigantojn en 672 urboj en 90 landoj. Ghi estis redaktita de Alexandre Baudry kaj unuafoje prezentita dum la Internacia Junulara Kongreso en Kievo kaj la Universala Kongreso en Kopenhago. Kiel en multaj aliaj movadaj statistikoj, ankaŭ en la nova adresaro la unuan lokon okupas Francio kun 169 gastigantoj. Francio havas ankaŭ la plej grandan nombron da urboj (91), kie troviĝas gastiganto. La pakistana urbo Multan siavice estas la urbo kun plej multe da adresoj (21).

En la 188-pagha poslibro troviĝas, krom la adresoj k.a. informoj pri la gastigantoj, ankaŭ mapoj kun indikoj pri iliaj loĝlokoj. Enestas ankaŭ reguloj kaj konsiloj pri la uzo de la servo.

La ideo pri Pasporta Servo, tiam sub la nomo Programo Pasporto, estis prezentita de la argentinano Rubén Feldman González en 1966. La unua adresaro lau la nuna sistemo, kun 40 gastigantoj, aperis en 1974 sub la gvido de Jeanne-Marie Cash el Francio. Ambau pioniroj estas gastigantoj ankaŭ en la nuna eldono.

En 2009, Pasporta Servo farighis ankaŭ socia retejo, www.pasportaservo.org, kie kaj gastoj kaj gastigantoj povas membrighi kaj kontakti unu la alian. Ghi ne anstatauas la presitan libron sed ofertas aldonajn servojn, haveblajn nur per Interreto: zomebla monda mapo, serĉilo, forumo por peti informojn pri

vojaĝo, kaj blogejo por rakonti pri siaj vojaĝoj. La retpaĝo nun havas pli ol 2000 uzantojn. La adresaro estas achetebla che la Libroservo de UEA. La prezo estas 9,00 EUR plus afranko (plus imposto de 6% en EU). Ekde 3 ekz. oni ricevas trionan rabaton.

Gazetaraj Komunikoj de UEA, 04-08-2011, N-ro 425

LA NEĜO

Vintro en Flandrio estas kutime laŭ sama kanvaso. Novembro-ŝtormoj, decembro- malvarma, sed apenaŭ frostaj tagoj, sed multe da pluvetaj tagoj. Pluvo plej tedaj kiu ŝajne neniam haltas. Pluvo kiu malsekigas malsupre de pluvombrelo same multe ol supran parton. Januaro- unuaj frostaj tagoj kun temperaturoj de minus 1-2 gradoj C kaj dum nokte ĝis minuso 10. Februaro alportas de tempo iom da neĝo kiu malaperas antaŭ suno enlitiĝas. Tamen suno estas apenaŭ videbla ĉar tro da nuboj ornamas la ĉielon.

Ĉi vintro la vetero ludis alian kanzonon. Mi memoras ke mi skribis al kara amikino, "Baldaŭ komenciĝas periodo de ŝtormoj; mi esperas ke ĝi ne tro fortas ĉar vidu, vento estas ne videbla kaj mi timas ĉion kio ne estas videbla."

Eble tial mi ŝategas la urban vivon. La aero apenaŭ aŭ neniam estas tute pura, ĉiam videblas la aero, de tempo eĉ iom flavkolora pro malpuraĵoj en ĝi.

Lastan novembron ne aperis la ŝtormoj, ili tute ne venis kaj profunde en koro mi iom malhavis

tion. Avantaĝo de ŝtormo estas ke ĝi liberigas duonmortajn foliojn de la arboj kaj post mallonga ludado sur tero, kie ili freneze postkuras unu alian, ili mortas finan morton por utili kiel nutraĵo por la naturo.



Antverpenano Jakvo Schram, tutmonda prezidanto de la Plena Komitato de SAT

Jam neĝis en novembro kaj tio memorigis min pri la tempo, kiam mi kiel juna bubo, havis akcidenton pro glacia trotuaro. Mi rompis femuron kaj devis resti 8 semajnojn en hospitalo. Kuracisto puŝis ŝtalan stangon tra mia genuo al kiu fiksiĝis drato -- sur ĝi kelkaj kilogramoj da pezunuoj por ke unu kruro post resaniĝo ne estus pli mallonga ol alia. La tuta konstruo iom similis al pendumilo konstruita supre al la lito.

La hospitalo estis propraĵo de la katolikoj kaj ĉiun tagon iu monahino venis en ĉambro, kie ni estis triope, por rakonti pri la bona dio kaj la filo kiu multege pli suferis ol ni, ĉar aĉuloj punis lin per iom pendi lin sur kruco fiksita per manoj kaj piedoj. La aĉuloj estis eĉ tiel kruelaj, eble por ŝpari monon, ili uzis nur tri najlojn. Unu

14

en ĉiu mano kaj nur unu por ambaŭ piedoj.

Daŭriĝ 6 horojn, diris la afabla monahino antaŭ ol Jesuo mortis. Feliĉe, nu tion mi nur multaj jaroj poste lernis, lia amatino Maria Magdaleno staris ĉe piedo de la kruco plorsingultante ĉar amato devis morti. Estis iom stranga rakonto ĉar unuflanke monahino diris ke mortopuno estas malbona, kaj aliflanke mi lernis en lernejo ke, la plej bona puno por aĉuloj estas mortopuno. Referenca punkto estis la usona Caryl Chessman kiu ek de 1948 ĝis 1960 estis en mortohalo. Mi memoras ke li studis en malliberejo kaj iĝis advokato.

Ĉi matene mi nepre bezonis mian drogon, kiu por mi estas bongusta "Snickers". La nuksetoj kaj ĉokolado donas al mi senton da feliĉo kaj pensoj al bonaj momentoj en vivo. Survoje al vendejo trairante glitan vojon pro neĝo kiu daŭre suferigas la piedirantojn kaj aŭtistojn, mi pensis pri tempo en hospitalo kaj Jesuo sur kruco kaj Caryl Chessman. Mi povis revidi la lastan intervjuon kiun Chessman donis al raportistoj de televido kaj gazetaro. Li fumis kaj li, absorbita en penso, flamigis alumeton kontraŭ la alumetskatolon. Neniam mi vidis alumeton kiu brulis tiel longe antaŭ ol li metis ĝin kontraŭ cigaredon. Li rakontis ke usona ŝtato erare ekzekutas lin.

Mi havis tiam 14 jarojn kaj mi kredis lin. Mi ne bone scias ĉu estis Jesuo aŭ Chessman, aŭ eble ambaŭ, kiu zorgis ke mi kontraŭas mortopunon. Mi ne povas imagi ke

iu ŝtato rajtas ekzekuti iun ajn. Laŭ katolikoj kaj la monahino en hospitalo, homoj kiuj malbonkondukas iras al infero, do neniun devas interveni ĉar la problemo solviĝas al si mem.

Nu intertempe mi jam delonge ne plu kredas pri ekzisto de dioj de la homoj kaj do aferoj kiel ĉielo, kie ĉiu manĝas rizokaĉon aŭ infero, kie ĉiu devas laboregi por ke ne estingiĝu la infera fajro, mortis kune kun la dioj de la homoj. Mi ankaŭ dubas ĉu plaĉus al mi manĝi, ĉiun tagon, rizokaĉon. Pri infera fajro mi ne havas vere bonan imagon.

Mi pasis garaĝon de Doc. Doc, eble estas titolo kiun li atribuis al si mem, havas garaĝon *The Body Shop*. Li estas bonega metiisto kaj kiam vi -- pro neĝo aŭ alia malbona afero -- kolizias aŭte, Doc povas ripari la aŭton tiel ke ĝi aspektas denove tute bela.

"Kiel vi, Doc", mi salutis lin. "Bonege, vere bonege" - li respondis - "Bona vetero por la komerco. Multege da laboro." En najbareco de la garaĝpordo mi vidis plurajn aŭtojn kiuj suferis akcidentojn kaj mi povas imagi ke por Doc estas tempo favora, jes eĉ en kriza tempo kiel nun.

Virino kun biciklo veturis sur trotuaro. Malantaŭ ŝi sidis infanon kun grandega kasko sur kapo. Certe li povis uzi kaskon eĉ kiam li havos 20 jarojn, tiel granda la kasko estis. Mi haltis kaj metis min iom pli proksime al fasado de la domo por ke ŝi povu preterpasi. "Koregan dankon, sinjoro", ŝi diris kaj tuj mi sentis min "knaba skolto" kiu faris sian bonan agon

de la tago, ĉar tion skolto devus fari se mi bone memoras.

“Saluton Hilda, kiel vi fartas hodiaŭ”, mi salutis la vendistino de la butikoj, kie mi kutime aĉetas mian “Snickers”.

“Malbonege, malbonege, la feka vetero estas terura. Mankas klientoj ĉar neniu volas iri tra la danĝeraj stratoj por aĉeti varojn. Ĉiuj iras unufoje semajne al tiuj damnaj grandvendejoj kaj por cetero de la semajno ne forlasas domon. La komerco suferas kaj mi malgajnas”, estis respondo de Hilda.

Mi iomete kungrublis kun ŝi por montri mian subtenon al ŝia diro kaj rapide forigis la paperon de la “Snickers” por ke mi povu havi mian ĉokoladon kaj nuksetojn.

Jam mezo de februaro kaj ĉiam neĝas, neĝas. Jes Hilda pravas, estas tempo merda.

Reirante hejmen mi vidis kelkajn junajn knabojn kiuj klopodis konstrui neĝviron. Tamen ili estas tro okupataj pri ĵeti neĝbulkojn unu al alia kaj ili gajas kaj bonfartas.

Stranga mondo, mi pensis. Kelkaj feliĉas, aliaj malfeliĉas kaj ĉiuj havas la saman veteron, la samajn kondiĉojn. Iom antaŭ la domo mi glitis kaj falis. Ne decas skribi la vortojn kiujn mi uzis, sed se ĉielo kaj anĝeloj ekzistas, ili ne kontentis pri miaj vortoj. Mi jam iom povis senti la inferan fajron ĉe sidvangoj kaj mi rapide klopodis ree stariĝi kaj singarde iri al domo.

Rapide mi ŝanĝis vestaĵojn ĉar estas tempo por prilabori la nemalhaveblan Sennaciulo-n, la revuon de SAT. En ĝi interesa dosiero pri eŭtanazio, kun tekstoj

15 favoraj kaj tekstoj malfavoraj. Sed unue aŭskulti la novaĵojn kiuj aŭdigis la radion. En malliberejoj de Belgio vivas 133 diversaj nacioj. Oni intervjuis la direktoron de la granda malliberejo el Loveno kie vivis preskaŭ 40 malsamaj nacioj kune en unu granda konstruaĵo. Laŭ la direktoro kun minimumo da problemoj, ĉar, li diris, la homoj en malliberejo estas homoj de bona volo kaj ili sukcesas kune vivi. La katolikoj kun la mohametanoj, la judoj kun la islamanoj, la malsamaj koloroj kaj devenoj, sen vere nesolveblaj problemoj.

La intervjuo iom konfuzis min. Ĉu homoj devas esti malliberaj por ke ili kapablu kune vivi en harmonio? Vere estas stranga mondo, mi daŭrigos esploron, por ke mi sciu antaŭ tago kiam mi devas iri al ĉielo aŭ infero, kion homoj bezonas por vivi en paco.

Jakvo Schram, 19.02.2010, Antverpeno

PRI PROTESTANTISMO (daŭrigo)


BAPTISMO

Baptismo estas la plej granda nekatolika kristana grupo en Usono, kaj havas milionojn da adeptoj alilande tra la mondo. Plej multaj baptistoj konsideras sin protestantoj, sed iuj malakceptas tiun nomon, argumentante ke la prauloj de baptismo jam ne estis romkatolikoj longe antaŭ ol la epoko de Kalvino kaj Lutero. Historie, la usonaj baptismaj grupoj devenis plejparte de la anglaj baptistoj de la unua duono de la 17a jarcento, kiuj ŝajne estiĝis kiam kelkaj grupoj de

16 anglaj puritanoj, ekzilite al Holando, ekkonis la instruojn de la menonanoj pri la bapto kaj la naturo de la eklezio (t.e., ke la eklezio konsistu el konfesintaj baptitaj kredantoj, kaj ke sekve oni ne baptu infanetojn). De la menonanoj la baptistoj akiris ankaŭ sian principon pri disigo de la ŝtato disde la eklezio, kiun ili unufoje realigis en politika komunumo kiam la baptisma pastoro Roger Williams fondis la kolonion Providence (nun la usona ŝtato Rhode Island) en 1636. Tri usonaj prezidentoj (Harry S. Truman, Jimmy Carter kaj William J. Clinton) estis baptismoj, kaj la konata estro de la movado por civilaj rajtoj de afrikdevenaj usonanoj, d-ro Martin Luther King, estis baptisma pastoro.

ANABAPTISMO

Anabaptismo ("rebaptantoj", el la greka *ana* = ree + *βαπτίζω* *baptizō* = bapto; germane: *Wiedertäufer*) estas nomo, donita de iliaj malamiko, al diversaj kristanaj grupoj, kiuj bapto plenkreskulojn, kiujn oni jam bapto infanaĝe. La movado komenciĝis en Svislando en 1525, unu jaron post la ekribelo de germanaj kamparanoj. Dum la ribelo Marteno Lutero subtenis la nobelojn kontraŭ la kamparanoj. Rezulte, la socio estis preta por "dua reformacio". Anabaptismo unue aperis en Zuriko, Svislando, kaj poste disvastiĝis ĝis Nederlando. La anabaptistoj svisaj, male ol kelkaj anabaptistaj grupoj pli nordaj (ekzemple tiuj en Munstero), estis ekde la komenco pacifistaj (laŭ Schleitheima konfesio).



Disvastigo de Anabaptismo 1525-1550 tra la regionoj de la Sankta Romia Imperio

La Konfeso de Schleitheim (germane Schleitheimer Artikel) estis redaktita en februaro 1527 de konferenco gvidata de Michael Sattler en la vilaĝo Schleitheim, Svislando. Ĝi havas la sekvantaj sep ĉapitroj: 1-Bapto de plenaĝuloj; 2-Ekskomuniko; 3-Rompado de pano; 4-Apartigo de malbono; 5-Paŝtistoj en la komunumo; 6-Uzo de la glavo; 7-Malpermeso ĵuri. La ĉapitro 6-Uzo de glavo fondis la modernan vojon de kristista pacismo kaj ordonis ke violenco devas esti uzata en nenia cirkunstanco.

Pro siaj kredo je senperforto kaj rebapto, la anabaptistojn svisajn multe suferigis aŭtoritatoj svisaj. La persekutado venis egale de la protestantoj, kiel de la katolikoj. Post Menno Simons, la anabaptistoj en Nederlando estis regroupigitaj kaj redifinitaj, kaj ili iĝis pacifistoj. Famaj gvidantoj anabaptistoj estis Menno Simons, Jakob Ammann, Michael Sattler, Conrad Grebel, George Blaurock, Felix Manz, Jakob Hutter, Peter Riedemann, Andreas Ehrenpreis, Johannes Waldner, etc


MENONISMO

Menono Simonido (Menno Simons - la literumo ne estis fiksita kaj oni trovas tre diversajn formojn; "Sim(m)ons(zoon)") ne estas familia nomo, sed nur la antaŭnomo de lia patro) (1496 - 1561) estis anabaptisma komunumestro el Frislando (nun en norda Nederlando kaj nordokcidenta Germanio). Li ordiniĝis kiel romkatolika sacerdoto kaj servis pastre en la gepatra vilaĝo, sed ĉ. 1530 li komencis dubi pri diversaj katolikaj doktrinoj, kaj serĉante la veron en la Biblio li konvinkiĝis, ke pri diversaj aferoj la Roma Eklezio malpravas. Li aliĝis al la anabaptismo, kies anoj jam atingis Nederlandon el Svisio, kaj baldaŭ li fariĝis konata gvidanto en tiu sekto — tiom, ke ĝis hodiaŭ la ĉefa anabaptisma konfeso nomas sin, kaj estas nomata, "Menonanoj". Menonanoj estas anabaptistoj kaj kristanoj. La svisa anabaptisma historio komenciĝis en 1525 en Zuriko, Svislando. La movado anabaptista disvastiĝis el Svislando ĝis Nederlando, kie la gvidanto Menono Simonido donis al ĝia ĉeffadeno sian antaŭnomon. La Svisaj anabaptistoj proklamis sin pacifistoj jam en 1527 per la Konfeso de Schleithem, redaktita de Michael Sattler. Ne ĉiuj anabaptistaj grupoj, precipe tiuj pli norde en Eŭropo, deklaris sin pacifistoj. Tamen nur tiuj grupoj pacifismaj plu vivas ĝis hodiaŭ.

Menonanj religiaj grupoj: Menonanoj la plej konservativegaj : Svacedruvera amiŝismo, Nebraska amiŝismo . Menonanoj konservativegaj : Amanismo, Nova amanismo,

17
Malnov-ordena menonanismo, Malnova kolonia menonanismo. Menonitoj konservativaj: Biĉia amanismo, Konservativa menonanismo, Meksikaj malnov-koloniaj menonanoj, Paragvajaj ĉakaj menonanoj. Menonanoj modernaj : Konferenco Generala de la Eklezio Menonana, Malnova menonanismo, Menonana fratarismo. Menonanoj diverslandaj: Meksikaj menonanoj, Rusaj menonanoj .

AMIŜISMO



Amiŝa kaj moderna veturado en kontrasto Pensilvanio, Usono, Foto: Nils Fretwurst
Amiŝo estas ano de religia grupo anabaptista kaj menonitdevena. Kaj amiŝoj kaj menonitoj estas pacistoj. Amiŝoj frue diferenciiĝis el la menonitoj en tio, ke la amiŝoj malpermesis la portadon de vestaĵoj kun butonoj, dum la menonitoj permesis ilian portadon. Por la amiŝo, la butono estis simbolo de la armeo, ĉar tiuepoke estis la armeanoj, kiuj unue portis butonojn. Ankoraŭ hodiaŭ, la amiŝoj ne portas eksterajn jakojn kun butonoj. Alia frua kutimo, kiu apartigis la amiŝojn el la menonitoj (kaj la unua kialo por la disiĝo de 1693) estis la insistado de la amiŝoj aserti la eviton (izoladon) de membroj, kiuj elektis forlasi la

18
sekton. La amiŝoj favoris striktan praktikadon de la evito de ĉi tiuj eks-membroj. Menonitoj, tamen, ne strikte devigis al ĉi tiun praktikon. La amiŝoj estas la idoj de svisaj anabaptistoj, kies origino datiĝas de 1525, unu jaron post la komenco de la ribelo de germanaj kamparanoj.

Fine de la 17-a jarcento, la anabaptistoj, kiuj dume nomis sin *Menonitoj* laŭ la nederlanda anabaptista gvidanto Menno Simons, komencis fuĝi el Svislando *amase*. Ili trovis rifuĝejon en Palatinato kaj en Alzaco. Estas tie en Alzaco, kie la amiŝoj disiĝis de la menonitoj en 1693. La amiŝa divido estis gvidita de Jakob Ammann kiu predikis novan reiron al pli rigora kaj *ne-mondema* vivstilo. La plejmulto el la menonitoj, kiuj elektis sekvi Jakob Ammann, estis svisaj menonitaj rifuĝintoj en Alzaco. Kelkaj menonitoj en Svislando kaj en Palatinato elektis ankaŭ sekvi Jakob Ammann, sed tie ili reprezentis minoritaton el la menonitoj. Dum en Alzaco kaj en Palatinato ekzistis pli da tolero por la svisaj anabaptistoj ol en ilia hejmlando Svislando, ĉi tiuj teritorioj estis jam ne pacaj. Fakte, Alzaco kaj Palatinato, kun ilia situo en la koro de Eŭropo estiĝis la bastiono por multaj el la militoj de la 17-a jarcento. Post jardekoj de milito la amiŝoj, la menonitoj kaj iliaj najbaroj estis pretaj forlasi la teritorion kaj sin turni al Ameriko. Ĉar fakte dum la jaroj de milito la rikoltoj estis bruligitaj kaj la malsatego kaŭzis eĉ kanibalismen inter la kamparanoj.

Wikipedia

KONGRESAJ FOTOJ UEA, SAT, HEF, BET



Fermo de 96a UK de UEA, 23-30/7



Grupo de belganoj dum inaŭguro de UK



Prezidanto Tsirimokos registriĝante en UK



Marcel Delforge en Kopenhaga Kongreso



Infana Kongreseto kantas dum fermo



Fotado en Eskorialo dum 70a Kongreso de Hispana E-Federacio 28.6/ 2.7



Samy Loisse membro de EBG dum UK



Belganoj kun prezidanto de HEF



Lila Loisse membro de EBG dum UK



Fotado dum 47aj Baltiaj Esperantaj Tagoj



Sarajeva Kongresejo, 84a SAT Kongreso



En Sarajeva Hotelo Terme, 30.7/6.8



Ŝildo de 47aj BET, 9-16 Julio

CHRISTIANE DE VLEMINCK



Membro kaj eksa estraranino de EBG dum prezidanteco de Emile Van Damme